

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR; 0,70 DOL; 2,15V.FR.

F. HEYDICH

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LA KVARFOLIA TRIFOLIO.

(La diamanta folieto)

Estis vespero, kiam Abdalah adiaŭis Kara-Ĉitan. En la nokto li iris hejmen. Antaŭe li ripozis iom. Li ekdormis kaj sonĝis. Tamen ankaŭ en lia sonĝo la pensoj estis pri la trifolio. La mirakla planto ĉiam pligrandiĝis, la folietoj iĝis homfiguroj kaj li vidis Leilan, Hafizon, Haliman kaj Kafuran, kiuj lin ĉirkaŭis kaj amoplene rigardis. „Ĝis morgaŭ,” li flustris, „ĝis morgaŭ!”

Vekiĝante li vidis la helan lunon. Li ekiris, kun ĉarmaj pensoj en la kapo. Allah vere benis lin.

Ĉe la unuaj sunradioj li ekvidis la tendaron de sia gento. Jam li aŭdis la blekadon de l' kameloj kaj de la ŝafoj, la bojadon de la hundoj. Li surgrimpis altaĵon kaj vidis virinojn, kiuj iras al la putoj kun akvokruĉo sur la kapo, kaj kamelojn, etendantaj la longan kolon. Sed, kvankam liaj tendo kaj ĝardeno estis la plej proksimaj, li tute ne vidis signon pri vivo tie. „Hafiz iĝas maljuna,” li pensis, „fakte mi ne povas foresti.” Kaj pli rapide li pasis, gaja pro tio, ke li surprizos ilin en la longa dormo.

Sed envenante la ĝardenon kaj ankoraŭ nenion aŭdante, li iĝis maltrankvila. Kaj eĉ pli, kiam la hundoj bonvenigis lin ne per gaja bojado, sed per malĝoja hurlado. „Allah estas granda!” li ekkriis. „Malfeliĉo envenis mian tendon.” Li volis voki, sed ne povis, la voĉo haltis en lia gorĝo. Fine li ekkriis: „Onklo, patrino, Leila, Kafura, kie vi estas?” Neniu respondo. Nur la palmoj susuris kaj la abeloj zumis.

Per malfirmaj paŝoj li eniris la tendon. Neniu troviĝis tie. Videble

okazis luktado : la mebloj kuŝis sur la tero, la tablo estis frakasita. La kurteno de la virina ĉambro pendis malsupren. Abdalah eniris. Jen lia piedo tuŝis kadavron : ĝi estis Hafiz, kuŝanta surdorse. En la maldekstra mano li tenis pecon da blua ŝtofo de la vesto de Leila. La dekstra ĉirkaŭpremis pecon da ruĝa ŝtofo : sendube ŝirita de l'vesto de la murdinto. Brava maljunulo!

Abdalah genuis apud la onklon kaj fermis liajn okulojn. „Dio estu favora al vi, same kiel vi estis al ni.” Tiam li eliris la tendon kaj firmpaŝe direktis sin al la tendaro. Sed duonvoje lia forto estis for. Li apogis sin al palmo kaj pafis per du pistoloj samtempe. Pro tiu ĉi bruo la aliaj, viroj kaj virinoj, alkuris. Abdalah laŭte riproĉis ilin, sed ili ne komprenis la kialon. Ili opiniis lin freneza. Sed, kiam li kriis, ke dum lia foresto oni murdis lian onklon kaj forrabis la edzinon kaj patrinon; kiam la virinoj, kiuj rapide iris esplori lian tendon, revenis plorante kaj plendante; kiam Abdalah ree riproĉis siajn samgentanojn, ke ili dormis dum tiu murdado, tiam respondis la estro : „Kial iu devus maldormi ĉe viaj familianoj, dum via onklo kaj via frato Omar ĉeestas?”

„Mia frato Omar? Ne eble!”

„Kun ses sklavoĵ li venis hieraŭ,” diris iu bedueno. „Mi eĉ helpis la maljunan Hafizon buĉi ŝafon por la vespermanĝo de la gastoj.”

„Tion do mia frato faris,” ĉagrenvoĉe diris Abdalah. „Konsilu al mi, kion mi faru?”

„Estas facile,” respondis la estro. „Vi estas fingro de nia mano. Kiu trafas vin, trafas nin, kiu deziras vian vivon, tiu deziras nian. Omar antaŭas nin per kelkaj horoj, sed se Dio helpos, ni kaptos lin antaŭ vesperiĝo. Rapidu bravuloj, pretigu la ĉevalojn kaj kunportu duoblan porcion da akvo; la vetero estas prema, la ledsakoj rapide sekiĝos. Kaj malbenita ĉiu el ni, kiu volos reiri antaŭ ol la malamiko estos kaptita.”

Baldaŭ ili estis survoje. Estis facile sekvi la karavanon, ĉar ankoraŭ ne la vento forviŝis la postsignojn. Abdalah nombris la minutojn, sed kiom ajn akre li observis la horizonton, nenio estis videbla. La aero brulis, la ĉielo antaŭdiris ŝtormon. La snufantaj ĉevaloj, ŝvitkovritaj, povis nur paŝe antaŭeniri. Kaj Abdalah timis, ke la venĝo ne estos por li. Sed jen, sur la horizonto li ekvidis nigran punkton. Ĝi estis la karavano. Sekuran lokon kontraŭ la ŝtormo ĝi serĉis apud la ruĝaj rokoj. „Antaŭen!” li kriis, „Dio donas ilin al ni!” Kaj forgesante la lacecon, ĉiuj pelis la ĉevalojn al la rabistoj.

Sed, sur senfina ebenaĵo oni ne facile surprizas malamikon : Omar jam rekonis siajn persekutantojn kaj ilin ne atendis. Li ordigis la kamelojn en vico, lokis la gvidistojn post ilin, kvazaŭ li intencas defendi sin, saltis sur la ĉevalon kaj forgalopis kun la ceteraj viroj en la dezerton. Abdalah atingis kun siaj viroj la kamelojn kaj post unu atako la gvidistoj jam forkuris al la rokoj. Jen virino aperis kaj kuris al Abdalah. Ŝi estis Halima, lia patrino, kiun ili postlasis. „Ne unu momenton atendu,” ŝi kriis al sia filo. „La negro kun la ruĝa mantelo, li estas la murdisto de Hafiz kaj li rabis Leilan. Venĝu nin!” Kaj kvazaŭ komprenante tiujn vortojn, lia ĉevalo kuregis kun li en la dezerton. Apenaŭ la aliaj beduenoj perokule povis sekvi lin.

Baldaŭ Abdalah atingis la rabistojn. La kolero forgesigis al li ĉian danĝeron. „Fiulo!” li kriis, „kien vi rifuĝos, se Dio vin donas al mi!” Kaj kun levita sabro li galopis meze de kugloj al la negro, kiu kunportis Leilan.

Post momento ili ambaŭ estis je granda distanco antaŭ la aliaj. La negro sur rapidega ĉevalo traflugis la aeron kiel sago. Sed kolero kaj venĝemo donis kvazaŭ flugilojn al la ĉevalo de Abdalah. En ĉiu sekundo ĝi venis pli proksime.

Leila vokis sian edzon. Ŝi provis rektigi sin de sub la premanta brako, sed vane ŝi baraktis kontraŭ la terura rabisto. Tamen subite ŝi kaptis la bridon kaj ektiris, pro kio la ĉevalo hezitis kaj momenton haltis.

„Lasu tion!” diris la negro, „lasu la bridon aŭ mi estos perdita.”

„Abdalah, helpu min!” petegis Leila, kaj malgraŭ la minacoj kaj batoj ŝiaj manoj tenis la bridon.

Per tio ŝi estis savita. Kiel fulmbrilo Abdalah sin ĵetis al la negro. Sed en la sama momento lia ĉevalo timigite flankensaltis. Blua maso estis falinta antaŭ ĝiaj piedoj. Abdalah aŭdis vekriadon, kiu tranĉis lin tra la animo. Li desaltis kaj prenis Leilan mortanta de la tero. La ponardo de la fimurdisto senvivigis ŝin.

Kiam la beduenoj alvenis, ili trovis Abdalahn ankoraŭ sur la sama loko. La kapo de la kara mortintino ripozis sur lia ŝultro kaj seninterompe li rigardis la palan vizaĝon, sur kiu estis paca rideto. La fortaj viroj lin ĉirkaŭis kaj pli ol unu ne povis reteni la larmojn. Sed Halima sin ĵetis al la filo kaj kriis : „Ĉu ni estas venĝitaj? Ĉu Omar estas trafita? Kaj la negro mortigita??” Tiam respondis bedueno : „Ni ne bezonas venĝi nin. La dezerta vento tion faros. Omar ne povos elsavi sin. Tie jam leviĝas la uragano. En malpli ol horo la sablo estos mortotuko por la krimulo.”

Sed Halima ne konsentis. „Mia filo,” ŝi ree kriis, „nia malamiko ankoraŭ vivas. Lasu la ploradon al la virinoj. Mortbatu la perfidulon. Dio estos kun vi.”

Tiuj ĉi vortoj vivigis Abdalahn. „Vi estas prava, patrino!” li diris. „Por vi la larmoj, por mi la venĝo.” Kaj, kisinte la patrinon, li grimpis sur la ĉevalon.

„Kion vi volas fari?” demandis la estro. „Ĉu vi ne povas vidi tiun fajran nubon, kiu alproksimiĝas? Ankoraŭ ni havas tempon por rifuĝi al la ruĝaj rokoj. Ĉu vi intencas kuri en la brakojn de la morto?”

„Adiaŭ,” respondis Abdalah. „Por mi ekzistas ripozo nur en la ombro de l'morto.”

Apenaŭ li rajdis iom sola tra la dezerto, kiam li jam vidis la unuan viktimon de la ŝamumo, la mortiga dezerta vento. Ĝi estis la kadravro de la negro en la ruĝa mantelo. La morto kaptis lin antaŭ ol Abdalah lin povis trafi.

Jen venis la uragano. La ĉielo estis laktoblanka. La suno aspektis kiel ardanta muelŝtono. Veneniga aero sekigis la gorĝon kaj ekscitis la sangon en la vejnoj. Eksonis de malproksime muĝado kvaŝaŭ de furioza maro. Kirloventoj levis la sablon. Kaj ĉie estis teruraĵoj kaj brula varmego.

La ĉevalo de Abdalah nur malrapide progresis. Ĝia mastro estis trankvila kiel iu, kiu ne konas timon, sed ankaŭ ne esperon. Li sentis nek la varmegon, nek soifon. Unu penso regis en liaj korpo kaj animo : trovi kaj mortigi la perfidulon.

Post unuhora rajdado li trovis ĉevalon surdorse kuŝantan en la sablo. Je malgranda distanco li aŭdis ĝemadon. Viro kuŝis tie en la polvo, mortanta pro soifo, kaj sen fortoj por eligi krion. Tiu viro estis Omar. Li ne rekonis Abdalahn. Li povis nur montri per la fingroj al sia sekiĝinta gorĝo.

„Jes, akvon vi ricevos,” diris Abdalah. „Ne tiel vi rajtas morti.” Li desaltis, forĵetis la pistolojn kaj la sabron de Omar kaj post tio li metis la ledan akvosakon al ties lipoj. Omar trinkis per grandaj glutoj la fluidaĵon, kiu redonis al li la vivon kaj jen, — li rekonis Abdalahn.

„Ĉu estas vi, kiu min savas?” li flustris. „Mi rekonas vian senfinan bonecon.”

„Filo de Mansur,” diris la bedueno, „vi devas morti.”

„Indulgon, mia frato!” kriis Omar, kiu nur nun ekkonis la situa-

cion. „Vi ja ne savas min por poste mortigi! Indulgon, en la nomo de ŝi, kiu estas la patrino de ni ambaŭ.”

„Halima malbenas vin,” estis la respondo, „vi devas morti.”

Omar rampis sur la genuoj al Abdalah : „Mia frato, mi scias, kion mi malbonfaris, mi meritas vian koleron, sed kiom ajn granda mia kulpo estu, lasu min forĉeti ĝin. Ĉu vi deziras ĉion, kion mi posedas; ĉu vi deziras esti la plej riĉa en Arabio?”

„Vi mortigis Hafizon, vi mortigis Leilan,” diris Abdalah malvarme, „vi devas morti.”

„Ĉu Leila ne plu vivas?” ekploris Omar. „Tio ne povas esti. Ŝia sango venu sur la kapon de la murdinto. Mi estas senkulpa en tio. Indulgi min, Abdalah, kompatu min.”

„Pretigu vin,” estis la nura respondo, dum Abdalah ekprenis sian sabron.

„Almenaŭ lasu min preĝi,” petegis Omar per emocia voĉo. „Vi ja ne povas deziri, ke la anĝelo de l'morto min kaptu, antaŭ ol mi petis al Dio favoron.”

„Diru vian preĝon,” respondis la bedueno. Kaj rigardante la preĝantan homon, li sentis, ke li perdas la kuraĝon por mortigi lin. Iam li amis lin, kaj ankoraŭ li amas. Li memoris pri la tagoj de ilia juneco, kiam ili kune ludis, kiam Halima tenis ilin ambaŭ sur siaj genuoj. Kaj ŝajnis al li, kvazaŭ la maljuna Hafiz diras : „Li estas via frato, ne mortigu lin.” Kaj tamen devis okazi.

Omar rimarkis, ke Abdalah estas en dubo. Kaj, ege plorante, li ekprenis la genuojn de Abdalah kaj petegis : „Ho, lasu al mi tempon por plibonigi min. Dio pardonas, ankaŭ vi pardonu. Li promesis la Paradizon al tiuj, kiuj regas sian koleron. Pardonu min, kaj Li estos favora al vi. Dio amas tiun, kiu agas kun amo.”

„Ekstaru,” diris Abdalah. „Tiuj ĉi vortoj vin savis. La venĝo estas por Dio. Li estu via juĝisto. Mi ne mortigos tiun, kiun nutris mia patrino.”

Omar ĝoje eksaltis. Sed tuj li diris : „Sed vi ne lasos min sola ĉi tie, ĉu ne? Tio estus pli kruela ol mortigo.”

Abdalah respondis nur per montro al sia ĉevalo. Omar saltis sur ĝin kaj, eĉ ne turnante la kapon, li malaperis.

„Antaŭen,” li pensis, „nun mi ree vivos. Abdalah estas tre nesingarda, ke li en tia vetero restas sola en la dezerto, sen akvo, sen ĉevalo. Tiun malsaĝecon li mem pagu. Mi spertis sufiĉan malĝojon pro tiuj beduenoj; kiom eble plej baldaŭ mi forgesu ilin.”

Abdalah iris hejmen sufiĉe malĝoja. Ne pro tio, ke li lasis al Omar la vivon. La koleron li forpelis el sia koro, sed la ĉagreno restis en ĝi. Grandaj larmoj ruliĝis sur liaj vangoj. Ĉiu, kiun li amis, estis forprenita de li. „Pardonu al mi, ho Dio, mian malĝojon,” li preĝis. „Kion vi faras, tio estas bona. Donu al mi la forton por suferi, kion vi destinas al mi.” Tiel preĝante li pasis tra sablonuboj kaj kirloventoj. Fine li devis halti. Stranga sento malklarigis lian kapon, li ne plu regis la pensojn kaj sentojn. Estis momentoj, dum kiuj li nenion vidis nek aŭdis. Kelkfoje li ekvidis malproksime ĝardenojn kun lagoj kaj floroj; la vento susuris tra la foliaro, fonto ekŝprucis meze en la verdaĵo. Tiuj ĉi vidaĵoj redonis al li iom da vivo kaj li trenis sin al tiuj sorĉaj akvoj. Sed — kruela elreviĝo — ĝardenoj kaj akvoj, ĉio malaperis, kiam li venis proksime; nur sablo kaj varmego estis ĉirkaŭ li. Abdalah sentis, ke lia lasta horo venas. „Estas nur unu Dio,” li elkriis, „kaj Mahometo estas Lia profeto. Estas destinite, ke mi ne elvenos. Sinjoro, helpu min kaj forigu de mi la teruraĵojn de l'morto.”

Li genuis kaj lavis la vizaĝon kaj la manojn, ĉar akvo mankis, per la sablo de l'dezerto. Tiam li komencis fosi per sia sabro la propran tombon.

Sed apenaŭ komencinte, li rimarkis, ke subite la uragano estas for. La horizonto heliĝis pli multe ol dum tagiĝo kaj ĝi malfermiĝis kiel tendokurteno. Ĉu tio estis nova iluzio? Vizio? Abdalah estis muta pro surprizo kaj admiro.

Antaŭ li estis senfina ĝardeno kun murmurantaj riveretoj. Arboj kun oraj trunkoj, folioj kaj fruktoj el diverskoloraj juveloj estis en ĝi kaj nekonataj floroj ĉie. Anĝeloj ŝvebis tra tiu Edeno per susurantaj flugiloj. Kaj li aŭdis mirindan muzikon, pli bela ol iam surtere aŭdita.

Anĝelo venis al li. En la mano ĝi tenis malgrandan diamantan folieton, sed kiom ajn eta, ĝi tamen lumigis la tutan dezerton. En songo Abdalah paŝis al la anĝelo.. Sed subite li haltis kun timo. Antaŭ liaj piedoj estis grandega abismo kun fumo kaj flamoj. Maldika ŝtalfadeno, pli mallarĝa ol haro kaj pli akra ol tranĉrando de glavo, estis la sola vojo trans tiu profundegaĵo, kiu disigis la teron de la ĉielo.

Abdalah jam malesperis, sed li sentis sin subite subtenata kaj fortigata de nevidebla forto. Hafiz kaj Leila estis apud li. Li ne vidis ilin, li ne kuraĝis reiri pro timo, ke li vekiĝos, sed ilian ĉeeston li sentis, iliajn mallaŭtajn voĉojn li aŭdis. Tiam li paŝis ŝvebante

trans la mallarĝa ponto kaj atingis la transan bordon. La Paradizo akceptis lin. Tie lin atendis la anĝelo kun la diamanta folieto kaj transdonis ĝin.

Por savi sian ĝismortan malamikon Abdalah oferis la propran vivon.

Tiu ĉi ago malfermis la Paradizon kaj havigis al li la diamantan folieton. La kvarfolia trifolio estis kompleta. Sed neniu povis vidi la Paradizon kaj vivi. Kun ĝojokrio Abdalah falis morta teren. La dezerto estis lia tombo. Sed lia animo vidis la ĉielon.

Laŭ Laboulaie.

F i n o.

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”.

En la komenco de januaro mi ricevis leteron de juna franca amiko, en kiu li petas enpresigi en „La Juno Vivo” novan rubrikon, por ke la junularo esprimu siajn ideojn kaj sentojn en ĝi. Ŝajnas al mi tre necesa kaj interesa rubriko, tial mi jam nun publikigas la leteron de la franca knabo kaj poste pensojn de legantoj.

Kara Amikino,

... Mi samopinias tute kiel vi rilate al la « Esperantismo », ĉar depost kelkaj jaroj, de kiam mi eklernis nian karan lingvon, mi konstatis, ke multaj homoj ne komprenas nin. Certe ili aprobas Esperanton. Estus tre utile, ili diras, sed tamen ili ne volas lerni ĝin, kvankam mi vigle propagandas. Do mi kredas, ke ekzistas alia vojo. Kia? Estas en Francio, eble en Nederlando same, junulargazetoj. Mi estas leganto de unu, „Madinette”, kaj samtempe mi estas „pioniro”. Mi skribas en tiu gazeto. Jen kiel. En ĉiu numero estas rubriko, en kiu oni rajtas skribi kelkajn liniojn sub „pseŭdonimo”. Tiel la legantoj estas kunlaborantoj en sia propra gazeto. Multe da gejunuloj aĉetas tiun „Madinette” simple por legi la verketojn de siaj nekonataj tamen tre amikaj kunlegantoj. Estas ankaŭ jam kelkaj esperantistoj, kiuj skribas en tiu junulargazeto. Mia „pseŭdonimo” estas la latina „Pax”, miaj nekonataj geamikoj estas : Verda Stelo, Esperanto, Blua Papageto, Ĉiuj Homoj estas Fratoj, Antaŭen, ktp., ktp.. Do mi volas nun peti al vi : Petu al la legantaro de „La Juna Vivo” kunlabori por plibonigi kaj pliriĉigi nian gazeton „La Juna Vivo”. — „Jes!” ili respondos. „Volontege!” Baldaŭ ni havos kernon de pioniroj por T.J.O. Mi estas franco, mi havas junan amikon germanan, aliaj, estas britoj, italoj, rusoj, japanoj, nederlandanoj, sed antaŭ ĉio ni estas anoj de la sama granda

familio, la familio de la estonta paca mondo, la esperanta familio, kiu neniam senkuraĝiĝos, sed kreskos pro sia kredo, kaj pro sia granda amo. Ĝi fariĝos la koro de la vera estonta mondo!! Vivu Esperanto, kaj ĉiam kaj ĉie ni batalas por ĝi, mia kara, nederlanda amikino. Inter ni ne plu estas landlimoj, ĉar sen ke mi komprenas la nederlandan lingvon kaj vi eble la francan lingvon, ni estas gefratoj dank' al la kara lingvo Esperanto.

Korege mi manpremas vin firme, via amiko.

H. T.

Naskiĝis

LUDOVIKO LAZARO

Filo de

C. Vrees-Pieters

G. Vrees

Amsterdamo 26-12-'38.

Hondiusstr. 7b.

Favora venteto blovis karteton sur nian skribotablon, enhavanta la sciigon pri la naskiĝo de infano kun tre konata nomo. Naskiĝis infano, Esperanto-infano! Kaj je kiom multsignifa dato ĝi naskiĝis! Je Kristnasko, je la festo de la revenanta lumo, al Esperanto-

familio en Amsterdamo naskiĝis fileto, kaj ni, esperantistoj, tutkore gratulas niajn amsterdamajn gesamideanojn.

La naskiĝo de tiu etulo, je tia multsignifa dato, je kiu ni ĉiuj estas sentemaj, memorigas nin pli forte pri alia infano, kiu naskiĝis pasintsomere. Ĝi ne estas hominfano, sed la frukto de homa spirito, kaj ĝi naskiĝis por samtempe doni al ĝi (kaj per tio al la tuta socio) pli altan vivcelon; por konduki ĝin per Esperanto al tutmonda paco!

Vi ĉiuj konas la infanon, kiun mi celas. Estas nia Tutmonda Junular-Organizo. Jam ne plu ĝi estas suĉinfano. Jam bone ĝi konscias, kion ĝi faris, faras kaj faros. Jam ĝi alportis feliĉon al multaj homoj diversnaciaj, kaj ankoraŭ pli multe ĝi faros. Ĝi unuigos la tutmondan junularon.

Por efektiviĝi tion ĝi bezonas la helpon de ĈIUJ, do ankaŭ de vi, kara leganto!

Tial ni ĉiuj en la komenco de la nova jaro ankoraŭ pli konscie eklaboru por T.J.O. La laboro eble estos peniga, sed la celo estas tiom altvalora, ke niaj pensoj ankoraŭ ne povas teni ĝin, sed ni nur komprenos, kiam ni spertos la benojn, kiujn donacos al ni... eterna mondopaco.

Leerdam (Ned.).

J. K.

...Do, amikino mia, mi estas certa, ke post kelkaj jaroj alvenos tempo kiam nia lingvo estos tiel bezonata, ke ne plu okazos polemikoj pri ĝi. La mondo alprenos esperanton. Disfalos la baraj muroj, kaj Esperanto venkos. En la nuna momento la tekniko antaŭeniras pli rapide ol la homa intelekto, sed tiu ne povas daŭrigi. Venos ŝanĝo, kaj tiam... ni konscios, ke ne vane ni batalis.

Ĉijare ni povas sentime festi la Kristnaskan feston.

Ĉiuj bondeziroj por la festo, kaj bonsanon dum 1939.

De via amiko, J. W. H. (Anglio).

...Ĉio kion mi legis pri la junularkunveno en la antaŭa jaro tre plaĉis al mi kaj jam en la pasinta jaro mi ne faris ferio-vojaĝon kaj deziris en ĉi tiu jaro partopreni. Mi volonte sciis, ĉu ankaŭ en ĉi tiu jaro estos banado ĉe marbordo aŭ ĉe lago.

Unue mi volas demandi ĉu estas eble, ke mi partoprenos.

Due ja estas la malfacilaĵo kiamaniere mi povas pagi la kotizon al vi. Mi estas 23-jara kaj **NOMUS TION MIA PLEJ GRANDA FELIĈO, SE MI POVUS PARTOPRENI...**

W. B. en Nordhausen am Harz (Germ.).

...Sen paco nebliĝos ĉia progreso. Sen paco la vivo estas malbela, kaj tiel ni ne rajtas nomi nin pli valoraj ol la bestoj.

Kion diros pri ni l'estontaj homoj, kiam ili konstatos, ke hodiaŭ pro la malplej valora sensencaĵo la homoj „rajtas” mortigi unu la alian? Malgraŭ niaj sciencaj kaj teknikaj progresoj ankoraŭ nun ni estas tro sovaĝaj... Bedaŭrindege!...

Do, kontraŭ la milito necesas, ke tiuj, kiuj amas la junularon, defendu nin kontraŭ la malbonaj personoj per vera, sincera kaj humana propagando. Ja, Esperanto tute faciligas ĉi laboron, sed mankas al ni gvidantoj. Ĉu nun vi pretiĝis por starigi la veran Tutmondan Junular-Organizon? Mi fidas al vi, kaj al vi mi elkore promesas mian helpon, se por tio mi kapablos.

En Portugal, feliĉe, nia registraro lastatempe jam komprenis iomete pli bone l'Esperanton. Tial, la ĵurnaloj jam publikigas artikolojn kaj sciigojn pri la Esperanto-movado...

...Kara kamaradino, nun mi finas ĉi leteron, dezirante al via bela ideo la plej bonan sukceson. En Aljustrel vi trovos malmultajn esperantistojn, sed ili ĉiuj bone sentas kaj scias la signifon de la

vorto „esperantismo”. Inter ni ni havas bonegajn esperantistojn, precipe, ĉar ili komprenas bone la idealon.

Adiaŭ, amikino, klopodu senĉese, kaj tie ĉi ni agos laŭ niaj kapablecoj... Adiaŭ, ĝis unu tago...

S. en Aljustrel (Portugaliao).

...Sincere vin salutas germana aktiva esperantisto. Jam ni estas multe malhelpataj pro malpermeso gvidi kursojn kaj eldoni esp. gazetojn en nia lando. Mi ne plu scias, ĉu mi al vi plendis ke oni konfiskis al mi la esp. librojn, sed ĉion mi rericevis. Al neniuj VERA esp.isto okazis ĝis nun io malbona. La plej multaj senkaŭze mal-kuraĝas publike uzi la lingvon.

Mi informiĝis per tri paĝa letero en germana kaj unu paĝo en esperanto rekte ĉe nia plej alta gvidanto Adolf Hitler. Lia anstataŭanto tre ĝentile respondis al mi post kelkaj tagoj, ke ili transendis mian leteron al la koncerna ministro por scienco, edukado kaj popolklerigo por ekzameni mian petskribon. Sed oni tute ne skribis al mi, ke mi ne rajtas montri min ĉie kiel esperantisto, kaj ankaŭ ĉiu havas la rajton ĝin uzi.

Do, bonvolu tion komuniki al la senenergiaj s-anoj, ke neniuj bezonas timi ion. La 17-an de ĉi tiu monato (septembro '38) mi ricevis de la ministro por scienco ktp. la komunikon, ke li je sia bedaŭro ne kapablas ion fari por la bono de nia helplingvo, tamen li ekzamenos mian skribaĵon. Sed neniuj malesperiĝu, nenie nia lingvo estas malpermesata.

Germanujo (septembro '38).

ENIGMOJ

- | | |
|---------------------------------------|---------------------------------------|
| 1. Kun m estas korpoparto | 2. Kun f estas kunulo de fajro |
| Kun p estas manĝaĵo | Kun l ebligas vidi |
| Kun r estas besto | Kun r estas trinkaĵo |
| Kun v estas sencela klopodado. | Kun z obtuza bruoj |
| Spiŝ Vovà Ves (Ĉeĥosl.). | J. HARGAS. |

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis 1 Aprilo.

LA SOLVO EL No 6.

Ludoviko Zamenhof (laca, urbon, dormi, okulojn, vetero, irinta, kruroj, oranĝon; — zorgis, arbaro, mankis, en, nokto, horoj, oreloj, flaris.

La premiojn gajnis : S.ro de Roest en Amsterdamo (Ned.) kaj S.ro Young en Nov-Jorko (Usono).

Por komencantoj.**ANEKDOTOJ.**

„Vi aspektas gaje. Kio okazis?”

„Mi venas de la dentisto.”

„Ĉu tio estas plezuro?”

„Jes, ĉar li ne estis hejme.”

Servistino nokte kuris en la dormĉambron de profesoro kaj kriis:
„Sinjoro, estas ŝtelisto en la biblioteko!”

„Kaj kion li legas?” kviete demandis la profesoro.

„Estas bonege, ke vi farbas la muron. Sed kial vi tiom rapidas?”

„Mi volas esti preta antaŭ ol la farbo-poto estas malplena.”

La amerika humoristo Mark Twain estis dum siaj junaj jaroj tre malriĉa. Iam li renkontis sinjorinon, kiu volonte helpis talentulojn. Mark Twain portis cigarkeston sub brako kaj laŭŝajne li estis tre okupata.

„Ho, sinjoro Twain, kien vi iras tiom rapide? Ĉu vi aĉetis cigarojn?”

Mark Twain unue rigardis al la kesto, tiam al la sinjorino, kaj respondis malrapide: „Ho ne, mi transloĝiĝas.”

Respondu al jenaj demandoj:

Kiu estas Mark Twain? Kia li estis en siaj junaj jaroj? Kiun li iam renkontis? Kia estis la sinjorino? Ĉu Mark Twain havis multan tempon? Kion la sinjorino demandis? Ĉu ŝi divenis ĝuste? Kion faris Mark Twain?

„Ĉu vi estas certa, ke el ĉi tiu semo kreskos altaj, fortaj arboj?”

„Absolute certe,” respondis la semo-komercisto.


„Bonege,” diris la optimisto. „Ĉu vi scias en ĉi tiu kvartalo butikon, kie mi samtempe povas mendi hamakon? (dormreto, por pendigi inter la arboj).”

„Knabo,” severe parolis la patro, „ĉu vi scias, ke vi meritas firman porcion da batoj?”

„Ho, paĉjo, ne faru tion, kian plezuron vi havos de tiu plorado?”

TASKO:

1. Kopiu kaj traduku en vian gepatran lingvon ĉiujn rakontojn en la rubriko „Por Komencantoj”.
2. Lerne parkere la mallongajn anekdotojn.



Tutmonda Junularorganizo.

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Ĝiro 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Koedijk (N.H.). Ĝiro 310334.

Por Anglujo : J. W. Holland, 61 Vandyke Rd., Leighton-Buzzard, Beds.

Simpatiuoj : La eksterlandaj geamikoj, kiuj varbas simpatiuojn sendu la kotizon al la ĉefperant(in)o.

Filmservo : Unu grandan deziron ni havas, ke baldaŭ en ĉiuj landoj ni povos prezenti ĉi tiun belegan filmon. Ĝi pli bone ol vortoj instruas al ĈIUJ homoj la Zamenhofan idealon. Varbu do simpatiuojn kaj elpensu ĉion por baldaŭ akiri la bezonatan sumon! Bonvolu ĉiam enmeti poŝtmarkon, se vi skribas al la filmservo!

„La Peranto inter la Perantoj”. La dua numero elĉerpiĝis, tial ni faros la 3-an numeron en pli granda kvanto(mil). Multaj laŭdis la enhavon de la 2-a numero. Niaj junaj redaktoroj do daŭrigu sammaniere.

„La Juna Vivo”-legantoj. Jam kelkcentoj da „Juna Vivo”-legantoj aliĝis al T.J.O., ĉar ili komprenas la signifon de ĉi tiu nova organizo. Ankoraŭ ni ne estas kontentaj. Espereble iom post iom ĉiuj fidelaj legantoj sekvos. La malalta kotizo de 1 guldeno jare (inkluzive „La Juna Vivo”) ne povas retenigi ilin.

Insigno. Jam pli ol 100 T.J.O.-anoj propagandas per nia belega insigno. Kie restas la aliaj? Mendu ilin ĉe „La Juna Vivo”. La prezo estas 30 cendoj.

„De Esperantist”. En februaro aperos nova organo „De Esperantist”, en la ned. lingvo. Ĝi estos kolportadnumero. La kolportantoj pagas por 50 ekz. nur 1,00 guldenon, kaj la vendprezo estas po 5 cendoj. Tuj post la apero ni sendos tradukon al ĉiuj landoj, por ke la esperantistoj ĉie sekvu nin. Jen kion skribis nia juna peranto en Anglio :

„Estas laŭdinda ideo eldoni „De Esperantist” por la nederlandlingvanoj, kaj mi multe esperas, ke ĝi sukcesos. Mi pripensis ion similan por Anglio, antaŭ ol mi sciigis pri via intenco, kaj espereble angla „frato” baldaŭ naskiĝos.”

Donacoj : S.ro P. T. en Venice-Cal. (Usono) : guld. 0,95; S.ro H. D. en Manchester (Angl.) : guld. 2,12; Esp. Grupo en Bergen (Ned.) : guld. 6; F.ino K. en Laren (Ned.) : gld. 1,00; F.ino v. d. M. en Leeuwarden : gld. 0,20. S.ro N. P. en Lund (Sved.) : guld. 1.02; F.ino S. en Rotterdam (Ned.) : guld. 0,30.

ORNAMU VIAN SKRIBPAPERON PER LA BELA T.O.J.-GLUMARKO !



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

TERVUREN (7-14 aŭgusto).

Estas nun certe, ke la festo okazos en la antikva vilaĝo Tervuren. En la venontaj numeroj ni detale priskribos la belegan lokon, kun ĝia riĉa historio. Tamen ni jam nun povas diri, ke Tervuren estas nomata la „Versailles” de Belgio. Estas eĉ ne unu loko en Belgio, kiu havas tiom interesan historion. Tervuren estas triflanke ĉirkaŭita per arbaroj.

Respondoj al kelkaj demandoj : Estas ebleco por naĝi, remi, ktp. Anoj de la „Toeristenbond” gvidos nin tra la arbaroj.

En Tervuren estas grandaj hoteloj. La komitato ankaŭ zorgos pri tendumtereno. Ni do atendas ĉiujn simpatiulojn de nia juna organizo en Tervuren !

Same kiel la antaŭan jaron ni verŝajne veturigos la an-

glajn infanojn per grandaj aŭtobusoj de Ostende al Tervuren. La aŭtobuselspezoj estos por la anglaj infanoj proksimume 3 guldenoj, por la nederlandaj infanoj ne pli ol 4 guldenoj.

La restadkosto estas por ĉiuj 7 guldenoj (140 fr. fr., 18 ŝil.), inkluzive ekskursojn, manĝojn, dormlokon, ktp.

Ekskursoj : S.ro Rainson projektis 3 ekskursojn, el kiuj ni elektu :

1. Vizito al internacia ekspozicio en Luik (Liège).
2. Namen, Dinant (groto), Hastière (groto), Givet (Francio).
3. Malmedy, Eupen, groto de Remouchamps.

Plue staras sur la programo vizito al Bruselo.

Belega Solvo. De kelkaj nederlandaj infanoj ni ricevis leterojn, ke ili ne povas ŝpari tiom altan sumon. Por ili ni trovis belegan solvon. Ĵus aperis nederlanda gazeto „De Esperantist”, kiu propagandas por nia bela idealo. Tiu gazeto ne havas abonantojn, sed ni kolportadas per ĝi. Kiu volas helpi, mendu 50 ekzemplerojn por 1 guld. La vendprezo estas po 5 cendoj. Do, bone kalkulu, tiam vi komprenos, ke estas bagatelo akiri la monon por la internacia kunveno. Vi faras belegan laboron, ĉar vi konvinkos la ne-esperantistojn pri nia alta ideo. Se vi tiel mem perlaboris vian kotizon, vi duoble ĝuos la feston en Tervuren !

Grava sciigo de la angla peranto. De angla amiko, kiu deziras resti anonima, mi ricevis sumon da mono kun jena celo :

Ni aranĝu en Anglio ekzamenon pri originalaj verkaĵoj de junaj geknaboj,



Muzeo pri Kongo.

kaj al la plej meritaj verkistoj ni donacu la sekvantajn premiojn : 1. Senpaga vojaĝo al Tervuren (inkluzive la kotizon por manĝoj ktp.); 2. Senpaga veturo al Tervuren. La ricevonto pagu la kostojn de manĝoj, loĝado, ktp.

Detalojn ni skribos en la venonta „La Juna Vivo”.

Pri la kantaro. En kelkaj grupoj oni jam pristudas la kantojn. Kiu ankoraŭ ne havas la Internacian Kantaron „L. J. V.” povas mendi ĝin ĉe „L. J. V.” po 20 cendoj. Ĉiu partoprenonto rajtas ricevi unu ekzempleron kontraŭ tiu malalta prezo. Studu fervore, por ke ni multe kantu !

Unua listo da partoprenontoj :

Nederlandaj knabinoj : 1. Rith v. Vlaardingen (16 j.), Nobelstr. 51B, Rotterdam; 2. Guur v. Ammers (16 j.), 3. Fie Jantjes (17 j.), 4. Alie Broekhuis (13 j.), 5. Bets Wit (14 j.), 6. Nelie Kool (15 j.), 7. Jenneke v. Veenendaal (18 j.), ĉiuj en West-Graftdijk (N. H.)! 8. Riek Verver (18 j.), Spijkerboor (N. H.); 9. Guus Bankersen (16 j.), Starnmeer n/b West-Graftdijk; 10. Mary Krijt, Veeteelstraat 156, Amsterdam.

Nederlandaj knaboj : 11. Bert v. Vlaardingen (12 j.), Nobelstr. 51B, Rotterdam; 12. Hubert Baardman (12 j.), Nobelstr. 43B, Rotterdam; 13. Koos de Haan (15 j.), 14. Wim v. d. Hoff (17 j.), 15. Wim v. Veenendaal (15 j.), ĉiuj en West-Graftdijk.



Kapucienen arbaro.

Gvidantoj : 16-17. Ges.roj Krijt, Veeteelstraat 156, Amsterdam; 18-19 Ges.roj van Veenendaal, West-Graftdijk ;20. F.ino Nelie Kool, West-Graftdijk.

Ĝeneralaj sciigoj. Kiu deziras tendumi en Tervuren bonvolu anonci sin kiom eble plej baldaŭ, por ke ni sciu, ĉu ni povas lui grandan terenon aŭ malgrandan.


Petu al „Vereeniging van Vreemdelingenverkeer” en Tervuren, kaj ankaŭ al „Office de Tourisme belgo-luxembourgeois” esperanto-prospektojn. Ili ankoraŭ ne ekzistas, sed estas la plej taŭga maniero por ĉijare akiri ilin.

Atentu, ke en la Internacia Junularkunveno en Tervuren nur T.J.O.-anoj povas partopreni.

„JUNA VIVO” — VOJAĜO AL MONT-BLANC.

Ĉi-jare „La Juna Vivo” organizas kampad-vojaĝon al Chamonix, ĉarma vilaĝo piede de Mont-Blanc. Ĝi okazos de 23 julio ĝis 6 aŭgusto, daŭros do 15 tagojn.

En la nuna numero mankas spaco por publikigi la tutan programon. Ĉiu, kiu interesiĝas pri ĝi, turnu sin al la redakcio por pliaj informoj. Ni mencias nur la kostojn : 40 guldenoj.



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Nederlando : 20-jara domkolorigisto dez. kor. kun ĉ. l. per il. pk. kaj let. Certe resp. J. de Graaf, Wal A117, St. Maartendijk (Z.).

Nederlando : Kelkaj personoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu leterojn al S.ro W. Raven, West-Einde, Koegras, Post Julianadorp (N.H.).

Nederlando : 14-35-jaraj gelernantoj serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo. Skribu al F.ino A. Vos, Burgerbrug, Zype. Ni certe respondos.

Nederlando : 17-jara junulino dez. kor. kun ĉiuj landoj. Certa respondo. Annie Hooyberg, Middelle (N.H.).

Nederlando : F.ino Anje Bosscher, Sumatralaan 5, Hilversum, dez. kor. prefere kun vegetaraj kongresanoj (Bern).

Nederlando : K.ino dez. kor. kun ĉiuj landoj kaj interŝ. poŝtm. Resp. certa. K.ino M. C. Koenen, Rechte Hondsb. laan 44, Heiloo (N.H.).

Jugoslavujo : S.ro Marolt Viljem, Prévaljé, deziras korespondi.

Nederlando : 10 geknaboj, 13-14-jaraj deziras korespondi. Skribu al S.ino J. de Ruyter-van Herwerden, Oudkarspel A 147.

Usono : Altlerneja Esp. klubo (13-19-jaraj geanoj) dez. kor. per leteroj kaj il. poŝtk. S.ro George Falgier, gvidanto, Winchester, Illinois.

Anglujo : 12-13-jaraj knabinoj deziras korespondi kun gejunuloj en la tuta mondo. Tinker's Farm Lernejo, Northfield, Birmingham.

Nederlando : Kelkaj Esperantistoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu multnombre al F.ino R. Westra, Stationst. 40, Hoogeveen.

Nederlando : S.ro K. Huysman, Veeringstr. 55, Zaandam, dez. kor. kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Respondo certa.

Anglujo : Entuziasmaj Bristolaj samideanoj aranĝos letervesperon, la 6-an de Marto. Skribu amase kamaradoj!! Unu respondo certigita. G. B. Tordoff, Folk House, College Green, Bristol 1.

Nederlando : Serĉas por siaj 65 gelernantoj, 12-40 jaraj, gekorespondantojn en la tuta mondo, S.ro T. Blokland, 't Zand (N.H.), kiu transdonos la koresponaĵojn ricevitaĵojn de li, al ili.

Latvujo : S.ro A. Strautmanis, Riga, M. Altonavas i 3-15, dez. kor. kun fotoamatoroj en la tuta mondo.

Nederlando : Henny Visser, 17-jara knabino, Westerweg 79, Alkmaar, dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Nederlando : La Esperanto-grupo el Julianadorp dez. gekorespondantojn en ĉ. l. Resp. certa. S.ro R. Koster, Langevliet, No 78, Julianadorp (N.H.).

Svisujo : La infanoj de Kinderheim Traugott en Herrliberg dankas pro ĉiuj ricevitaĵoj leteroj. Estas neeble respondi al ĉiuj aparte.

Aliĝu al T.J.O. Jarkotizo nur 1 ned. guldeno, inkluzive „La Juna Vivo”. Familianoj de T.J.O.-anoj pagas nur 20 cendojn jare.

ANONCETOJ.

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Weesperzijde 3, p/a. Nieveld, Amsterdam.

KALENDARO POR 1939. Sendu al viaj gekorespondantoj kalendaran poŝtkarton por 1939. Klarlegebla, dukolore presita sur bona kartono, ĝi estas ŝatata donaco, kiun la ricevinto volonte uzos tutan jaron; tial ĝi estas unu el la plej taŭgaj kaj malkaraj propagandiloj. Prezo : 20 ekz. por hgld. 0,44; 100 ekz. por hgld. 1,76. Specimene 5 ekz. por hgld. 0,12½ aŭ unu resp. kup. Du modeloj haveblaj : No 1101, presita laŭlonge; No 1102 presita lularge. Eld. H.E.O., Abcoude, Holando. Poŝtkonto 88015.

INTERNACIA LERNOLIBRETO „LA JUNA VIVO”. Tre malkara lernilo por komenckursoj. Enhavo 15 lecionoj. Prezo po 20 cendoj. Ĉe mendo de almenaŭ 20 ekz. la prezo estas po 16 cendoj plus afranko.

INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”. Enhavo : 34 kantoj kun muziknotoj. Belaspekta libreto, praktika formato. Prezo : 35 c. Du ekz. por 0,50 guld.

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. Libretoj 32-26 paĝoj, po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvidantoj rajtas peti specimenon. Mendebila al „La Juna Vivo”.

TAŬGAN MATERIALON POR ĈIUJ KURSOJ oni trovas en la binditaj jarkoletoj de „La Juna Vivo”. Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. oni pagas por la 2-a kaj 3-a kolekto nur po 35 c. plus afranko, por la 1-a po 45 c. plus afranko. Unuopaj ekz. kostas 45 kaj 55 cendoj plus afranko.

LA MONDFAMA „LIGO SEN NOMO”. Pri la „Ligo sen nomo” (movado por plibonigado de l'mondo) aperis en Esperanto tradukita broŝuro inter-esplena, kiu senpage estas havebla ĉe la verkinto, Lia Pastra Moŝto H. de Greeve en Haarlem, Nederlando kaj ĉe la ĉefo de la Esperantofako de l'nomita ligo, S.ro P. A. M. v. d. Strien en Oosterhout, N. Br., Nederlando.

ESPERANTO SEMAJNO SUR „HERZBERG”, ASP AARGAU, SVISLANDO. 5-a ĝis 12-a de aŭgusto '39. Plena pensio en la popolaltlernejo 26-35 fr.; kotizo 10 sv. fr. Loĝado en la apuda Junulargastejo aŭ en propra tendo estas ebla. Petu informojn de W. Kobelt, Landstr., St. Margreth Kt. G.

„ESPERANTA INTERNACIA”. La monata organo de Internacia Esperanto-Ligo aperos enmaĵpli granda formato, sed kun 32 paĝoj kaj kovrilo, anstataŭ 16, kiel ĝis nun. Specimenon sendos laŭ peto la Centra Oficejo de la Ligo, Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

La XI-a NEDERLANDA ESPERANTO-KONGRESO okazos dum Pasko 1939 (8-9-10 aprilo) en Rotterdam. La kostoj por la tuta kongreso estas 2 h. guld. Brila programo. Petu informojn kaj aliĝilon al la sekretario: C. Baksteen, Willem Buytewechstr. 255c, Rotterdam.